

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur
tero.
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-burĝono en
proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ ku-
timo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo
brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun
ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular'
ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fi-
dela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' ju-
vela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj, sentemaj flugis for
el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma
mondo?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose
of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 -
†1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOW-
SKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).*

Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el
la retejo [http://www.netlibrary.net/eBooks/
Wordtheque/eo/221211.TXT](http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT).*

Thomas Moore,
'T is the Last Rose of Summer

'T is the last rose of summer left blooming alo-
ne;
All her lovely companions are faded and gone;
No flower of her kindred, no rosebud is nigh,
To reflect back her blushes, to give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one! To pine on
the stem;
Since the lovely are sleeping, go sleep thou with
them.
Thus kindly I scatter thy leaves o'er the bed,
Where thy mates of the garden lie scentless and
dead.

So soon may I follow when friendships decay,
And from Love's shining circle the gems drop
away.
When true hearts lie wither'd and fond ones
are flown,
Oh! who would inhabit this bleak world alone?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS
MOORE (*1779-05-28 - †1852-02-25).*

Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la rete-
jo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri
la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vi-
du la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.
org/wiki/Thomas_Moore](http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore).*